GISTO, MAJ-08
ottovaske@.com.br
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Senpaga, por ĉeestantoj dum la Verda Kafo
Forestantoj sentu sin iom ŝuldaj.

0505050505050505050505050505050505050505050505050505050500505050505050505050505

RESOPIRO

La karaj VK-anoj eble ridetos se mi laŭte manifestas mian resopiron pri la ĵus pasinta kunsido, dum mi veturas hejmen. Unu monato estas longa tempodaŭro ĝis la venonta, por ĝui la ĉarman etoson dum la kunsido, ĉefe kun la lango oleumita kaj spicita per la bongustega vino mendebla en TUTTY'S,

ELSTARAN DANKON

Mondograndan dankon mi adresas al nia kara amiko Arno kaj lia nepino, pro la fakto ke li la nura, inter multaj promesintaj amikoj, efektivigis la helpon liverante al mi la ĝustan "recepton" por ke de nun mi ne plu ĝenas la legantojn per rimedo utiligata kiam mankas ne praktike uzebla literfonto kun ĉapelitaj literoj. Nun mi havas la UNIKODOn. Pravige: mi tenis la devojigan sistemon por ke la tekstoj restu klare legeblaj en ĉiuj komputiloj, eĉ en la malmodernaj tipoj. Mi atentas, ĉu ankoraŭ envenos multaj plendoj pro la ĉapeletoj, kiuj frenezigas kelkajn aparatojn. – Nun mi tre esperas ke niaj malnovaj rondanoj kiel Miriam, Karesema kaj aliaj, kiuj aĉe paŭtas pro la surogata skribo en Gisto, revenos aktivi en nia tradicia tranĉeo, kiu ekzemplodone rezistas kontraŭ lingvopoluado. Koran dankon al ĉiuj niaj sindonaj kompanoj kiuj zorgas, por ne kaŭzi troan resopiron en la ceteraj rondanoj.

GRAVA VIZITANTO

Vizitis la Gaŭĉolandon kaj sian panjon/geparencaron nia kara amiko Lenio Marobin, alveninta en la 26ª/04 sed ne sufiĉe frue por saluti la VK-rondanojn, tro bedaŭrinde. Kiel jam tradicie, li venis al Kaiurbo kaj tagmanĝis kune kun la radiokolego Laŭro kaj mi. De la "Unua Mondo" li rakontas pri eletronikaj novaĵoj kaj ni bavas pro envio...! Jam alveninta en Londono, li vivsignis kun plendo pro manko de komforto dum la longa flugo, ke li ricevis nur magran kafoservon kaj la kutima ĉareto kun delicaĵoj ne vidiĝis.Flugo por Sudamerikaj malriĉuloj, mi konkludas.

PREMIO IBEST

Ĵus alvenis la ĵurnalo "Diálogo Espírita" (DE) de Marto/Aprilo/08, plena de edifaj tekstoj. Inter ili pledo, far la bonfara organizaĵo "Lar Fabiano de Cristo"=(LFC), kiu kandidatas al la premio IBEST en ties konkurso sob "Cidadania"=Civitaneco. LFC petas ke oni voĉdonu favore al ĝi kaj aldone bedaŭras ke ĝi, la bonfara kandidato, kalkulas nur 1% de la voĉdonoj inter la 69 enskribitaj organizaĵoj. – Aldonas mi: en la ĵurnalo DE mi trovis neniun vorton pri aŭ en Esperanto, kiel okazis antaŭ kelkaj jaroj. Elmontro de simpatimanko far DE kaj la konkursanta organizaĵo pri la lingvo internacia ne inklinas la geesperantistaron doni helpan antaŭenpuŝon al la postiĝinta kandidato

en la IBEST-konkurso. Ĉu Esperanto ne plu indas mencion en la vasta usonangla lingvolernejo nomata Brazilo? Domaĝo.

ENIGMO

Mi estas mi mem dum vi ne scias kiu estas mi, sed kiam vi scias kiu estas mi, ne plu mi estas mi. Kiu estas mi ? (El kaprompilo ie legita) La solvon vi trovos ie en ĉi Gisto-numero.

REAGOJ

Laŭnature Gistolegantoj, kiuj skribe iam iel reagas ril. al enhavata temo, estas la diligentaj geZaghettoj, Cezar, Kleonice kaj Elizabeth. La ceteraj legantoj devas diligenti, por ne fariĝi indaj je kromnomo. Kaj mi daŭrigas puŝi ĉiujn al parkerigo de eta sed bela poezio. Kion vi faras kiam iu interesato petas vin diri kelkajn frazojn en nia belsona língvo? Poezio malfermas ŝancon emfaze diri kalkajn frazojn ne facile tuj inventeblaj por la oportuna momento. Mi scias...pesimistoj tuj reagos dirante ke vere interesemaj homoj pli raras ol gajnintoj loterigajnintoj kaj ke, pro tio ne valoras la penon parkerigi "perlon". Manko de investemo bremsas ion ajn entreprenon, ĉiuj scias. Do antaŭen, investu almenaŭ iomete da via kara tempo.

ORANĜOJ

Miaj pampelmusoj ĉijare estas vere bongustegaj tamen plene maturiĝas malmultaj. Ĉi oldulo ne plu rajtas riski falon de la stuparo dum la laciga tasko de unuopa ensakigo. El tio rezultas ke nur la parencaro ĝuas parton el ĉiu oranĝo. Al aliuloj mi negas oranĝojn, pro skrupulo, pro la vermoj kiuj enestas. Oni devas senŝeligi ilin por poste ekvidi la punkton kie loĝas vermo, eltranĉi tiun parton kaj foruzi la restantan duonon aŭ trionon. La amikino Niceja kaj edzo iam konstatis tion ĉe mi.

RADIO

Kurtonda disvastiĝo, laŭ la 40m bendo,en la nuna aŭtuno fariĝas tre aĉa. Laŭ skalo de 0 ĝis 9 ĝi restadas inter 1...3 kaj ofte, nulo. Monate mi raportas al ĈRI. Kompense ĝi sendas al mi la bele presitan dumonatan ĵurnalon Mikrofone, kun informoj pri ĝia multflanka aktivado. Ĉu vi jam adresis mesaĝon al la Ĉinia registaro, pro la katastrofo ĵus suferita, far la grandega tertremo? Nu, do...

SANO

Nuntempe okazas serĉesploroj pri miaj etaj kapturniĝoj nestabila paŝado sur ebena trotuaro kaj troa forgesemo.Ĉu tio signifas vizitkarton fare de Mr.Alshajmer al ĉi oldulo? Oni esperas, ke ne.

Bonhumoro:
Amiko:kion bonan vi eksciis dum via vizito al la antaŭdiristino?
- Ne valoris la penon eniri.
- Nu, kial ne? -
- Ĉar, kiam mi frapis la pordon, ŝi demandis: kiu frapas ?
Solvo: la propra enigmo.

Maksimume bela ino akompanata de mezaĝa viro elvenas motelon. Tre entuziasme, interalie li deklaras al ŝi, ke neniam antaŭe li ĝuis tiel amorplenan nokton. Nun, por senti min dudek jarojn pi juna, alveninta hejme mi tuj razos min.

- Aĥ, se mi antaŭe estus scia pri tio, mi estus skrapinta vian barbon antaŭ ol ni enŝoviĝis la liton. – Kiu spertas pri tiaj predemaj ĉiesulinoj certe komprenas, la flankan signifon de ŝia diraĵo.

ĈE BUĈISTO

Haltas aŭtaĉo.Ulo envenas kaj demandas, ĉu vi havas lumbaĵon? – Certe jes. – Bv pesi 10 Kg por mi.- Ĉu vi havas bovopostaĵon? - Jes. – Pesu 20 Kg. - Ĉu vi havas fortajn brakojn? - Jes. - Levu la brakojn! Estas atako, enaŭtigu la viandon, ne reagu!